Julio Baghy

VIKTIMOJ

Romano

Sesa eldono

ELDONEJO FENIKSO * 1991

KVINA ĈAPITRO

La vagonaro ekmoviĝis. En la kupeo estis malvarme. La petrollampo palpebrumante lumigis la kadukan internon. Dika glaciornamaĵo kovris la fenestrojn de la vagono.

Johano, tirinte sin en anguleton, senvorte rigardis la rustan anson de la interkupea pordeto. La virino, por varmiĝi, premis sin forte al li.

Kontraŭ ili sidis korpulenta kamparano ronkante.

– Johano Juroviĉ, faru ion, ke li ĉesu ronki, – diris ŝi nerve. – Mi ne povas elteni la ronkadon.

Johano mallaŭte ekfajfis. La ronkado iom mallaŭtiĝis. La virino ekridis.

– Vi estas tre lerta, Johano Juroviĉ. Mi uzos ĉi tiun rimedon ĉe mia edzo. Li terure ronkas.

Johano mallaŭte rimarkis.

– Kion vi farus en mia ĉambro? Precipe, kiam Varga ronkas. Li ŝajnas senfeligi vulpon dum la dormo.

La konduktoro venis kun kontrolanta milicano.

– Dokumentojn, gesinjoroj! Dokumentojn!

Johano montris sian pasporton. Ĝi kaj la biletoj estis en ordo.

Nun la milicano ekskuis la dormantan vilaĝanon.

– He! Vekiĝu! Montru la dokumenton!

La kamparano dormeme elpoŝigis eluzitan kartonon kaj transdonis ĝin. Dum la milicano ĝin rigardis, la kamparano denove ekdormis kaj ekronkis terure.

La virino ŝtopis la orelojn per la fingroj. La milicano kaj la konduktoro ridegis.

– La bileton, sinjoro! La bileton! – skuis lin la konduktoro.

– Nu! Kion?

– La bileton, sinjoro!

– Aha! Tuj ... tuj ...

La kamparano post longa penado trovis la bileton en iu interna poŝo de sia vesto, kie li gardis ankaŭ sian monon. – Unu-kaj trirublaj bankbiletoj falis el la poŝo. Johano prenis kaj donis ilin en la manon de la dormema kamparano.

– Nu! Kion vi volas? – demandis la kamparano kaj senkomprene rigardis la monbiletojn.

– Via mono! Vi faligis ilin, – klarigis Johano.

– Jes? ... Mia mono? ... Nu bone! – kaj li ŝovis ilin en la poŝon de sia pantalono.

La milicano kaj la konduktoro ridante foriris.

La kamparano tuj ekdormis. Denove komenciĝis la ronkado. Johano fajfetis. La ronkado ĉesis, sed nur por momentoj. La virino nervoziĝis.

Tiel estis dum la tuta, duonhora vojaĝo.

La vagonaro haltis antaŭ la stacidometo. La virino rapidis antaŭen kaj Johano estis sekvonta ŝin, kiam ies mano lin retenis.

Johano turnis sin kaj la kamparano singarde ĉirkaŭrigardante flustris hungarlingve al li.

– Kamarado! Ne iru hodiaŭ en la urbon!

– Kial?

– Mi ne povas diri pli. Eĉ tio, kion mi diris, estas jam tro multa.

– Mi devas akompani tiun ĉi sinjorinon en la urbon.

– Ĉu ŝi estas via amatino?

– Ne.

La kamparano eklevis la ŝultrojn.

– Faru kion vi volas! Mi nur bonintence avertis vin, samlandano.

Ekstere la virino atendis.

– Sinjoro Bardy! Rapidu! Estas froste, – ŝi vokis Johanon.

Johano atente rigardis la vizaĝon de la nekonato.

– Kiu vi estas?

La kamparano senresponde disbutonumis sian mantelon kaj montris ruĝan rubandeton sur sia brusto. Momenton li retenis Johanon, subite li elvagoniĝis kontraŭflanke kaj kurante tra la reloj malaperis en la apudan arbaron.

Johano surprizite kaj konjektante malbonon sekvis lin per rigardo.

– Sinjoro Bardy, kio estas al vi? – interesiĝis la virino, kiu intertempe denove envagoniĝis.

– Nenio grava! – respondis distrite Johano.

La virino esploris la seriozan mienon de Johano.

– Ĉu io okazis?

– Jes! Io okazis kaj mi ne scias kion fari.

– Kio?

– Hodiaŭ nokte io okazos en la urbo. Verŝajne ŝanĝo de reĝimo.

– Kiel do?

– Mi ne scias, sed tiu ĉi kamparano havas la insignon de bolŝevikoj.

– Nu, tiun multaj havas kaj nenio.

– Sed li avertis min, ke mi ne iru en la urbon.

– Kaj vi ektimis! – diris la virino. Al Johano ŝajnis iom da malrespekto en ŝia voĉo.

– Mi ne timas, sed eviti malagrablaĵon estas pli prudente ol kuri kun la kapo al muro.

– Vi do ne volas min akompani hejmen?

– Tion mi ne diris. Kio ajn okazos, mi devas akompani vin. Vi ja estas hodiaŭ sub mia gardo.

Ili elvagoniĝis kaj ekiris al la urbo.

La nokto silentis. Ĝiaj malgrandaj lampetoj palpebrumis dormeme inter la blankaj nuboj.

Johano kaj la virino rapidis tra la senhomaj stratoj, stratetoj. Kelkfoje aŭdiĝis longe tirata bojado.

– La hundoj maltrankviliĝas, – rimarkis mallaŭte Johano.

– Ĉiunokte ili maltrankviliĝas, – kaj moketo aperis en ŝiaj okuloj.

– Ne ĉiunokte. Mi jam centfoje vagadis nokte en la urbo, sed neniam estis tiel mortŝajna la urbo ... Rigardu tiun dometon. Tie loĝas Medvedjuk, la tigro. Tiu domo fruvespere ĉiam estis luma. Nun la fenestroj dormas. La tigro antaŭsentas danĝeron. Mi kuraĝus veti, ke li jam ne estas en la urbo.

– Kial vi nomas sinjoron Medvedjuk „tigro"?

– Ĉar li estas vera tigro. La rusaj soldatoj donis al li ĉi tiun nomon. Ni, militkaptitoj nur transprenis la trafan epiteton. Pri kruelan homon mi neniam konis. Li estas kruela kaj sangavida.

– Sed la tigro havas tre ĉarman edzineton kaj beletan fileton. Lia edzino tre plaĉas al via amiko. Doŝky tre simpatias kun ŝi.

– Doŝky? Li nur kompatas la malfeliĉan virineton kaj la knabeton. Tiu ĉi kompato naskiĝis en li, kiam la tigro loĝis kun sia familio en nia militkaptitejo kiel komandanto. Post la vizito de la svisa Ruĝa Kruco oni translokis lin en la urbon per subita ukazo.

– Jes, mi rememoras. Oni multe parolis pri tio en la urbo.

– Pro diversaj kruelaĵoj li devis forlasi sian postenon. Lia plej abomena kruelaĵo estis, kiam dek barakojn plenajn de militkaptitoj li ordonis ekbruligi. En ili estis pli ol tri mil malfeliĉuloj, suferantaj je ekzantema tifo. Ili ĉiuj mortis kaj li eĉ fan-

faronis, ke jen estas la plej efika rimedo por haltigi la epidemion.

La virino ektremis.

– Ĉu al vi estas malvarme? – demandis Johano.

– Ne! ... Mi vidas antaŭ mi tiujn malfeliĉulojn, kiuj post la najlitaj pordoj pereis en la flamoj ... Ni rapidu!

Ili ekrapidis. La domo de la prokuroro estis preskaŭ ĉe la alia ekstremo de la urbo kaj ili apenaŭ faris la duonon de la distanco.

El iu apuda strato subite rusa patrolo el dek soldatoj kaj unu suboficiro venis renkonte al ili.

– Ĉu vi vidas, sinjorina moŝto, la patrolo estas pli granda ol ordinare?

– Jes! – respondis la virino. En ŝia voĉo oni povis rimarki malagrablan surprizon.

La patrolo haltis. Ĝia komandanto alparolis ilin.

– Dokumentojn!

Johano montris sian pasporton. La komandanto rigardis kaj redonis ĝin. Nun li rigardis la vizaĝon de la virino, lumigante ĝin per la manlanterno.

– Nu bone!

Li salutis la virinon kaj mallaŭte komandis al la patrolo.

– Maar-ŝu!

La patrolo ekmarŝis, sed la komandanto ankoraŭ postrestis minuton kaj flustre diris al ili:

– Rapidu kaj ŝlosu forte la pordojn. Kiu ajn bruus, frapus, ne malfermu!

– Ĉu okazos io? – demandis la virino, ne povante kaŝi sian timon.

– Kontraŭrevolucio! ... Ankoraŭ ne certaĵo, sed spionoj raportis, ke bolŝevikaj bandoj cirkulas ĉirkaŭ la urbo kaj volas ataki la urbon. Ĉu la sinjoro prokuroro estas hejme?

– Ne! Li vojaĝis ankoraŭ frumatene al Tockoesavsk.

– Hm! Domaĝe, ĉar la bandoj venas el tiu direkto.

La virino ektremis. La suboficiro rapidis al siaj subuloj.

– Johano Juroviĉ, mi timas.

– Ne timu! Li diris, ke ankoraŭ ne estas certe ... Ni rapidu!

Preskaŭ kurante ili atingis la longan straton, ĉe kies fino jam vidiĝis la belaspekta domo de la prokuroro. Apenaŭ ili faris kelkajn paŝojn, el la malproksimo aŭdiĝis pafado.

– Jen! Ĝi jam komenciĝas, – flustris la virino kaj forte premis sin al Johano.

– Eble ĝi estas nur senkaŭza alarmo – Johano provis trankviligi ŝin.

Ili atingis la domon. Johano malŝlosis la pordegon kaj transdonis la ŝlosilon al la virino.

– Zorge ŝlosu la pordegon! – li diris kaj premis ŝian manon por adiaŭo.

La virino forte ekkaptis lian manon.

– Kion vi volas?

– Mi iras hejmen.

– En tia danĝera tempo?

– Ne grave! Vi opiniis antaŭ nelonge, ke mi estas malkuraĝa. Mi nur vin avertis pri la danĝero, mi timis nur pro vi. Adiaŭ!

– Ne, ne, ne! Vi devas resti! En tia tempo devas esti viro en la domo.

– La bone ŝlosita pordego pli bone defendos vin, ol mi sen armilo.

Subite aŭdiĝis bruo de veturilo kaj la pafado estis pli laŭta kaj ofta. Ĉe la fino de la strato aperis armita trupo.

– Je la amo de Dio! Venu! – kriis la virino kaj tiris Johanon en la korton.

La paŝoj de la trupo pliproksimiĝis. Johano ŝlosis la pordegon. Ankaŭ la riglilon kaj la fermostangon li prizorgis atente. Dume la virino frapis la pordon de la vestiblo.

Post kelkaj minutoj interne aŭdiĝis dormemaj paŝoj.

– Kiu? – demandis raŭka virina voĉo.

– Malfermu, Marusa, malfermu! Mi estas, – ŝi respondis tenante Johanon ĉe la mano.

La pordo malfermiĝis, ili enrapidis.

– Zorge ŝlosu la pordon, Marusa!

La pelton ŝi ĵetis for de si.

– Ĉu la fenestro-fermiloj estas fiksitaj, Marusa?

– Jes! – murmuris la knabino.

Johano pendigis sian kaj ŝian peltojn sur vestpendilon.

– Ĉu vi pretigis la samovaron?

– Jam de longe!

– Nu bone. Portu ĝin en la ĉambron!

La servistino iris en la kuirejon kaj ili paŝis en la ĉambron. Agrabla varmo akceptis ilin.

La virino turnis la butonon de la elektra lampo. Johano staris en la mezo de la ĉambro kaj lia unua rigardo renkontis la grandan portreton de la edzo, kiu ŝajnis riproĉe rigardi lin.

Ŝi ekĝemis, kvazaŭ liberiĝinte de ŝarĝo.

– Dank' al Dio! Ni estas ekster danĝero.

Johano nenion diris. Li estis profundiĝinta en la observado de la portreto.

– Kion vi rigardas?

– Vian edzon.

– Kie? – ŝi demandis kun pretera ektremo.

– Tie. Sur la muro ... Vidu kiel riproĉe li rigardas nin!

– Vi havas viglan fantazion.

La servistino venis en la ĉambron kun la samovaro. Ŝi metis ĝin sur la tablon kaj atendis pluajn ordonojn.

– Kion vi volas, Marusa?

– Mi volis demandi, ĉu vi deziras ion?

– Nenion Marusa, nenion. Vi povas foriri.

La servistino ekiris al la pordo, sed la virino haltigis ŝin.

– Marusa! Kiel fartas la bubeto?

– Li estis iom maltrankvila, sed antaŭ unu horo li ekdormis.

– Vi povas foriri por dormi.

– Jes!

La servistino restis senmova, rigardis sian sinjorinon kvazaŭ havante ion por diri.

– Ĉu vi volas ion, Marusa?

– Nenion! ... Mi nur havis malbonan sonĝon ... Mi vidis la sinjoron tute sanga en mia sonĝo kaj tio ne signifas ion bonan ... Ankaŭ vin mi vidis en blanka kitelo kaj vi ...

– Mi ne estas scivola pri viaj sonĝoj, – interrompis ŝin la virino.

– Bone, – la knabino levis la ŝultrojn kaj murmuris kvazaŭ al si, – sanga korpo kaj blanka kitelo signifas malfeliĉon ... Mia avino estas jam tre maljuna kaj ŝi ĉiam diris, ke la sonĝoj antaŭmontras la sorton ... Mi nur volis diri ...

Ŝi forlasis la ĉambron.

Johano ankoraŭ staris en la mezo de la ĉambro. Superstiĉaj sentoj vekiĝis en li. La virino, kvazaŭ instinkte diveninta ilin, iris al Johano kaj milde ĉirkaŭprenis lin.

Johano per delikata protesta gesto liberigis sin el la ĉirkaŭplektantaj brakoj.

– Via edzo estas en danĝero. Mi sentas tion ... Oni persekutas lin. Mi sentas tion ... Ĉu vi ne sentas?

La virino staris momenton, kvazaŭ kaptite de ia terura sugesto, sed poste nerve ekridante ŝi iris al la tablo por pretigi la teon.

– Malvarme estas al mi, mi deziras glaseton da teo. Ĉu vi deziras ĝin kun lakto?

Johano nenion respondis. Li sidiĝis apatie, rigardis la ornamojn de la tablotuko. Ili estis broditaj rozoj, grandaj ruĝaj rozoj, sed pro la ofta lavado ili ŝajnis nur grandaj sangmakuloj. Almenaŭ la fantazio de Johano vidis ilin tiaj.

La virino metis glason da vaporanta teo antaŭ Johanon, ektuŝis lin por veki el la apatio.

– Jen la teo!

Johano levis la kapon, sed lia rigardo renkontis tiun de la edza portreto. La virino, kun subita decido, iris al la muro kaj turnis la bildon aliflanken.

– Nu! Ĉu bone?

– Kial vi turnis ĝin? Kial vi turnis ĝin? – demandis Johano kaj lia voĉo esprimis teruran timon. – Oni kutimas turni la bildojn de la mortintoj ...

– Johano! – ŝi ekkriis.

– Returnu ĝin! Returnu ĝin!

La virino, sub la sugesto de ĉi tiu nerve kaj krude ripetata ordono, jam etendis sian manon al la bildo, kiam iu forte ekfrapis la pordegon.

Ŝi rigidiĝis pro ektimo.

La brua frapado sur la pordego ripetiĝis. Post momento aŭdiĝis rapidaj paŝoj sub la fenestro kaj iu kun freneza obstino frapadis la eksteran fenestrotabulon.

– Malfermu la pordon! – kriis Johano kaj li salte leviĝis de la tablo. – Marusa! Marusa! Malfermu la pordegon!

Marusa ektiminte kuris en la ĉambron. Johano kriis.

– Marusa, venu kun mi malfermi la pordon!

– Vi freneziĝis, Johano! Vi freneziĝis. Ĉu vi forgesi, kion diris la patrolkomandanto? Al neniu ni malfermu la pordon dum tiu ĉi nokto!

– Al neniu jes, sed al via edzo ni devas ĝin malfermi. Marusa, portu la ŝlosilojn!

La knabino kuris en la vestiblon. La virino haltigis ŝin.

– Marusa! Marusa! Ne kuraĝu malfermi!

La ekstera bruo sonis kaj sonis, ankoraŭ pli forte, pli malespere.

Johano krude puŝis la knabinon en la vestiblon kaj eltiris la keston de la skribotablo. Li serĉis revolveron.

Ekstere ĉesis la frapado, sed eksonis krioj. Laŭtaj sovaĝaj krioj.

Johano fine trovis la revolveron, ekkuris al la pordo, sed la virino ĵetis sin al lia kolo.

– Johano! Kion vi volas fari? Vi volas, ke oni mortigu nin! Ili estas sovaĝaj, brutaj kamparanoj! ... Johano! Marusa, ne lasu lin! Dio mia!

– Lasu! Lasu min! Via edzo staras antaŭ la pordego kaj oni persekutas lin! Mi sentas tion. Mi antaŭsentas tion! Marusa la ŝlosilojn!

Marusa staris tremante kun la ŝlosiloj en la mano kaj ekploris.

– Kion fari? Kion fari? – ŝi ĝemis.

– Eh! Lasu! – kriis Johano kaj per ĉiuj fortoj li puŝis de si la virinon. Ŝi falis sur la kanapon.

En tiu momento ekstere ektondris pafo. La bruo ĉesis momenton, por poste eksplodi pli furioze.

En la ĉambro aŭdiĝis krako kaj bruo de rompiĝanta vitro. La edza portreto falis de la muro kaj ĝia vitro rompiĝis en cent pecojn.

Johano rigardis tien kaj ekkriis terurite.

– Vi mortigis vian edzon! Vi mortigis vian edzon!

La superstiĉo kaptis ambaŭ virinojn. Marusa, genuante antaŭ la sankta lampeto, plore ĝemadis. La virino, baraktante sur la kanapo, ŝiradis siajn harojn. El la tria ĉambro eksonis infanploro. Johano kun mieno de frenezulo rigide rigardis la portreton de la

edzo, kiu kap-altere, kvazaŭ masko de mortinto, kuŝis apud la muro.

Ekstere la bruo fariĝis tute freneza. Raŭkaj ridegoj eĥis tra la stratoj kaj oni povis klare aŭdi voĉon:

– Lasu lin, kamaradoj! Ĉu vi ne vidas, li ne povas veni plu?

Johano rekonsciiĝis kaj iris al la vestiblo por malfermi la pordon. Marusa sekvis lin. La virino kuris en la trian ĉambron al sia ploranta fileto.

Johano malfermis la pordon de la vestiblo kaj aŭskultis.

Sur la strato estis laŭta disputo.

– Li devas veni kun ni!

– Ĉu vi ne vidas, kamarado, ke li ne povas?

– Sed li devas, mi diras ... Dum la nokto de la libereco ĉiu devas veni kun ni.

Nun raŭke oni ekkantis.

Fine falis en polvon la idol'
Venkas ĉion la volo de l' popol'
Fine falos de trono ĉiu reĝ'
Kaj triumfos egaleco de la leĝ'.

Ĉe la fino de la kanto ektondris pafo.

– Lasu, mi diris! – diris akra voĉo kaj iu forte frapis la pordegon per kalkanumo. – Ni iru!

La ekstera trupo ekiris kun laŭta ridego kaj sonis la kantado en akompano de pafoj.

Kamaradoj alvenis venka hor'.
Kaj tagiĝo purpuras en la kor'.
Nia ruĝa standardo flirtas nun
Kaj la burĝoj tremtimas pro la pun' ...

La kantado pli malproksimiĝis. Johano iris al la pordego. Marusa sekvis lin.

– La ŝlosilojn, Marusa!

La knabino donis la ŝlosilojn. Ŝi premis siajn orelojn al la pordego.

– Aŭskultu, Johano Juroviĉ – ŝi diris kun tremanta voĉo. – Li stertoras, kvazaŭ li sputus sangon el la gorĝo ... Aŭskultu!

Johano singarde malfermis la pordegon. En la sama momento vira korpo, kvazaŭ senvive, falis al lia brusto. Johano preskaŭ perdis la ekvilibron.

Kun la helpo de Marusa li trenis la stertorantan viron en la korton. La luno eklumigis la vizaĝon de la viro kaj Marusa ekkriis.

– Ivan Nikolaeviĉ!

– Kiu? – demandis Johano surprizite.

– Ivan Nikolaeviĉ Radĉenko! La servisto ĉe la tribunalo. Hodiaŭ frumatene li portis la sinjoron per glitveturilo al Tockoesavsk.

– Ĉu li estas vundita? – demandis Johano kaj dume li reŝlosis la pordegon.

Marusa ekridis.

– Ne, tute ne! Li estas ebria ... Kiel porko li estas ebria.

– Kie estas la sinjoro? Demandu lin, Marusa! Tockoesavsk estas tritaga vojo de ni kaj li jam revenis ... Demandu lin!

Marusa ekskuis la senpovan viron, kiu kuŝis sur la tero kaj malfacile, kvazaŭ stertorante spiradis, kraĉadis ĉiumomente.

– Ivan Nikolaeviĉ! ... Ĉu vi aŭdas!? ... Ivan Nikolaeviĉ!!

La viro malfermis la okulojn kaj mucide ridetis.

– Kamaradoj, alvenis venka hor' ... – li komencis kanti, sed liaj lastaj vortoj jam dronis en dormo.

– Ni nepre devas ekscii, kie li lasis la sinjoron prokuroron, – diris Johano kaj ankaŭ li ekskuis la ebriulon. – Ivan Nikolaeviĉ! Ĉu vi aŭdas? ... Rekonsciiĝu!

– Je ... s! – singultis la ebriulo.

– Kie estas via sinjoro!

– Kaj tagiĝo ... fine polvo ... n la idol' ... – kantis plu Radĉenko.

Johano per sia tuta forto ekskuis la ebriulon kaj krie ripetis la demandon.

– Ivan Nikolaeviĉ! Kie vi forlasis la sinjoron prokuroron?

Radĉenko ekridis.

– Li estas bona homo ... Li estas bo ... na hoomo!

– Bone! Boone! Mi scias, sed kie vi lasis lin? ... Homo, parolu!

Radĉenko viŝis la vizaĝon per sia neĝkovrita mano. Marusa kelkfoje vangofrapis lin. Johano konstante skuis kaj penis levi lin de la tero.

– Ivan Nikolaeviĉ! Ĉu ne honte al vi?! – riproĉis lin Marusa. – Porko vi estas, vera porko!

– Homo! Parolu je la amo de Dio! Kie estas via sinjoro?

Radĉenko, kun videbla penado, klopodis ordigi siajn pensojn.

– La sin ... joro ... Eh! ... Mi ne sci ... as, – kaj la ofta singultado apenaŭ lasis lin paroli.

– Kie li loĝas? – demandis Johano la knabinon.

– Ĉi tie, en la ĝardena dometo.

– Ĉu li havas edzinon?

– Jes.

– Voku ŝin tuj!

Marusa ekiris al la ĝardeno. Sur la sojlo de la vestiblo aperis la sinjorino kun knabeto dujara sur sia brako.

– Kio estas, Johano Juroviĉ? – ŝi demandis.

– Ivano Nikolaeviĉ venis hejmen tute ebria ...

– Ah! ... Ivan Nikolaeviĉ? ... Kaj kion li diras?

– Eĉ unu saĝan vorton ni ne povis ekscii de li ... Li estas kvazaŭ porko.

Radĉenko komencis kanti.

– Kama ... radoj ... maradoj ... doj ... doj ... doj ... – kaj li ekridegis.

La sinjorino reiris internen por gardi la knabeton de malvarmumo kaj post minuto ŝi revenis sola.

Radĉenko ankoraŭ kantis.

– Fine falis ... ĉar vere falis ... ĉar deviiiis fa ... li la ... idol'.

La sinjorino ekkaŭris al la ebriulo.

– Ivan! ... Ivan Nikolaeviĉ!

– Ivan Nikoa! ... Nikla ... Hehe! – komencis mediti la ebria viro. – Kiu estas Ivan Nikolaeviĉ? Kiu? ... Kiiiuu? ... Ivĉjo Nikloviĉ estas mi. Mi estas Nikolav ... Pro diablo ... Mi ne po ... vas eldiri ... Hehe! Mi estas ... mi essss sss ... sss ... Silentu! ... Si ... lentu!

La virino skuis lin.

– Ivan! Kie vi forlasis mian edzon? ... Ĉu vi aŭdas?

Radĉenko larĝe malfermis la okulojn, kvazaŭ montri, ke li estas en tute sobra stato.

– Nat ... nature mi aŭdas! Kial ne aŭdi? ... Mi hav ... as orelojn. Mi aŭdas, vi kaj ili ... Jes!

– Ivan – daŭrigis la demandadon la virino. – Ĉu oni mortigis mian edzon?

– Kial mortigi? Kial mort ... i ... gi?

– Ĉar li ne revenis kun vi.

– Li ne venis, ĉar li ne volis, – kaj li kantante daŭrigis laŭ la melodio de la marseljezo. – Li ne veenis, ĉar li iiris for ... tramtratam ta ... tam ta tam.

– Ĉu li ne diris ion al vi?

Radĉenko daŭrigis la kantadon.

– Kaj li diris jen leteeero, donu tiion al edzin' ...

– Ĉu li donis leteron al vi?

– Jes li donis leteron tra tra ra ...

– Kie? Kie estas la letero?

Radĉenko kun larĝaj gestoj daŭrigis la kantadon.

– En la pooŝ' de l' mantel', ta tara ta ...

Johano traserĉis la poŝojn de la ebriulo kaj trovinte la leteron transdonis ĝin al la virino. Ŝi kuris kun ĝi en la domon vokante Johanon post si.

– Venu, Venu! ... Lasu tiun porkon. Lia edzino jam venas por li.

Johano ekiris al la vestiblo. La edzino de Ivan Nikolaeviĉ venis kun laŭta blasfemado tra la ĝardeno.

Johano estis jam sur la sojlo, kiam li aŭdis la bruon de la sinsekvaj vangofrapoj, per kiuj la edzino regalis sian edzon.

Radĉenko plenpulme kantis.

– Fine falis en polvon la idol' ...

– Falis vi en polvon, vi, ebria porko, ke Dio sekigu vian gorĝon! Vi, fava porko!

Johano iris en la ĉambron.

La virino sidis sur la kanapo kaj legis la leteron. Apud ŝi sidis ŝia fileto. Johano haltis atende antaŭ ŝi.

Fininte la legadon ŝi senvorte transdonis la leteron al Johano. Li komencis legi la disĵetitajn liniojn.

Amata edzino!

Terura situacio devigis min forlasi la hejmon. Mi mensogis al vi, dirante ke oficialaĵoj vokas min al Tockoesavsk. Ne pro tio mi foriris. La menŝevika reĝimo falis kaj mi, kun kelkaj, devas min savi per kuro. Kiam vi legos tiun ĉi leteron mi jam estos malproksime de la urbo. Mi savas min por vi. Post la paso de la uragano, espereble baldaŭ, mi revenos al vi.

Mi rifuĝas kun sinjoro Medvedjuk, kies spionoj ankoraŭ ĝustatempe avertis nin pri la danĝero. Kien ni iros, mi ankoraŭ ne scias, sed eĉ se mi scius, mi ne kuraĝus sciigi vin nun pri tio.

Mi estas plena de timo pri vi, sed mi esperas, ke la virinojn indulgos la nova reĝimo kaj ĝi ne venĝos la forkurintojn je iliaj senkulpaj parencoj.

Ĉion vi trovas en ordo en mia skribotablo. La dokumentojn transdonu al tiuj, kiuj venas en la nomo de la nova registaro kaj penu akiri ilian favoron por vi. Turnu vin por defendo al sinjoro Bardy, kies samlandano estas unu el la ĉefuloj de la ruĝa armeo. Li verŝajne ne rifuzos sian helpon al vi kaj al nia malgranda Fedja. Li estis al mi ĉiam bona amiko, kiu havas koron por la malfeliĉuloj. Mi ne estos sendanka al li post mia reveno.

Ne maltrankviliĝu pro mi, ĉar, kiel eble plej baldaŭ, ni revidos unu la alian. Ĉiutage kisu anstataŭ mi la malgrandan Fedja! Ĉiam rememoros pri vi via malfeliĉa edzo. Fedja.

Dum la legado la virino atente rigardis la mienon de Johano. Ĝi jen esprimis doloran surprizon, jen ekflamis pro subita kolero.

Nun li redonis la leteron. Senvorte. Estis silento dum kelkaj minutoj.

La virino leviĝis de la kanapo, iris al la skribotablo kaj fermis la leteron en la tirkeston.

– Nu! Kion vi opinias? – ŝi komencis.

Johano ne respondis. Turmentaj pensoj atakis lin. Kion diri aŭ kion fari? Terura situacio. Lasi virinon al la duba protektado de militkaptito, kiu mem estas sen defendantoj. Kiamaniere li povus gardi ŝin kaj ŝian fileton kontraŭ tiuj, kiuj venos en la nomo de la nova reĝimo? Li estas ja fremdulo en tiu ĉi lando, kie li ne havas civitajn rajtojn. Kial pensis ĝuste pri li la forkurinto?

– Ĉu vi ne havas opinion, Johano Juroviĉ, aŭ via opinio estas tiel profunde ofenda, ke vi ne kuraĝas ĝin diri?

– Ne!

– Kial vi ne diras do?

– Ĉar mi ne scias, kion diri kaj kion fari.

– Vi estas prava. En via situacio ankaŭ mi ne povus tuj decidi. Mi eĉ ne indignas pro tio. Sed mi devas rimarki ion. Mia edzo forlasis nin je la duba favoro de vandaloj. Tion mi ne bedaŭras, ĉar, se ĝi estas puno, mi meritas ĝin. Mi neniam amis lin, naŭze mi turnis min ĉiam de li. Sed li trudis al vi neelporteblan respondecon per sia peto kaj tio ĉi estas tre ĝena kaj tre hontiga afero por mi. Mi vidas, ke vi ne volonte akceptas la protektadon. Mi komprenas vin. La sola argumento, kiun mia edzo havas por senkulpigi sin, estas, ke inter la soldatoj kaj gvidantoj de la nova reĝimo estas ankaŭ viaj samlandanoj.

– Sinjorina moŝto ...

– Ankoraŭ mi ne finis ... Mallonge: mi devas konfesi, ke mia edzo konas mian neestingeblan amon al vi.

– Katja!

– Ne timu! Mi mem diris tion al li. Mi mem!

– Kaj li?

– Li silentis, ĉar li ne havas rajton fari riproĉojn al mi. Mi levis lin al tiu pozicio, kiun li okupis ĝis nun.

– Mi ne komprenas vin.

– Estas malfacile kompreni tion, ĉar la plena konfeso eble detruus nian amikecon. Eĉ tiun atoman estimon, kiun vi sentas al mi, mi perdus per la sciigo de la vero.

– Vi devas esti pli sincera.

– Ne postulu tion, Johano Juroviĉ! Ne postulu tion!

La virino kun petega mieno staris antaŭ Johano. Li ekkompatis ŝin.

– Vi estas prava, Katja. Mi ne havas rajton demandi vin.

La virino iris tute proksimen al li kaj diris kun certeco en sia voĉo.

– Nur vi havas rajton, Johano, kaj neniu krom vi. Mia edzo ĵetis min al vi. Mi apartenas de nun al vi. Nur al vi!

Ŝi karese ĉirkaŭbrakis Johanon.

Johano staris senmove. Liaj pensoj vagadis tre malproksime. Li vidis antaŭ si siajn proprajn. La infano sur la kanapo, la virino, flustranta amajn vortojn, kiel iam lia edzino, la intima varmo de la hejmo fremda, kiu senĉese mistifikas lin, la tuŝo de karesantaj manoj, ĉio ĉi dum momento ŝajnis belega sonĝo, kiu katenis lin.

– Johano, mi estas via. Mi estas via rajta posedaĵo. Li donis min al vi, ankaŭ li donis vin al mi ... Kaj mi amas vin, Johano, tiel sincere, tiel sindone, kiel ankoraŭ neniu amis vin ...

La virino, sentante sian superecon, premis sin al la brusto de Johano, Johano ne kontraŭstaris. Li ne sciis, kion diri?

– Johano! Ankaŭ vi amas min! – ŝi flustris. – Vi ne povas tion nei plu. Ankaŭ vi amas min, Johano. Vi, mia kara, mia sola konsolo!

Kaj ŝi etendis siajn lipojn por kiso. Johano prenis ŝian blondan kapon inter siajn manojn kaj senvorte rigardis al ŝiaj brilantaj okuloj.

– Kisu min! – spiris la virino apenaŭ aŭdeble.

Johano jam forgesis pri ĉio. Li vidis nur la ridetantan tenton antaŭ si. Li sentis la varmegan spiron de la soifaj lipoj. Lian animon sklavigis la potenca sugesto de la flamantaj okuloj kaj lin kaptis neretenebla sopiro.

– Katja! ... Katja! ... – li flustris sinforgese kaj liaj lipoj jam estis tuŝontaj la ŝiajn.

– Al paĉjo! ... Al paĉjo! – ekploris la infano sur la kanapo.

Johano subite rekonsciiĝis. Al li ŝajnis, kvazaŭ lia propra infano estus lin avertinta. Flamruĝo de honto kaj kolero ekbrulis sur liaj vangoj. La virinon li forpuŝis de si kaj ekkriis plengorĝe.

– Marusa! ... Marusa!

La virino, terurite de la mieno, tremante rigardis lin.

– Kio estas al vi? ... Kio okazis?

– Nenio okazis! Nenio! Dank' al Dio! ... Dio intervenis. Li avertis min per la buŝeto de via infano ... Kvazaŭ mia infano estus kriinta.

Histerie ekridis la virino, Johano kriadis.

– Marusa! ... Marusa!

– Kion vi volas? – ŝi demandis kun subita konsterniĝo.

– Mi volas foriri el tiu ĉi domo ... Mi volas foriri tuj, por neniam reveni ...

– Johano!

La virino falis antaŭ li kaj spasme ĉirkaŭprenante liajn krurojn ŝi petegis.

– Johano! Ne foriru! ... Ne forlasu min ... Kompatu min! ... Johano, kompatu min!

Johano penis liberigi sin de la virino, kiu en malespera barakto tenis lin preme.

– Marusa! ... kriis Johano, kaj senpacience li rigardis al la pordo.

La manoj de la virino tuŝis la revolveron, forgesitan en la poŝo de Johano. Kun subita decido ŝi elpoŝigis ĝin kaj saltleviĝis.

– Iru! Iru, sed en la sama momento, kiam vi transpaŝos la sojlon, mi estos mortinta ... Iru do!

Johano saltis al la virino, penis forpreni la danĝeran ilon el ŝia mano. La infano krie ploris. La pordo malfermiĝis kaj Marusa kuris en la ĉambron kun hirtaj haroj, dormema vizaĝo. Ekvidinte la revolveron en la mano de sia sinjorino, ŝi terurite ekkriis.

– Jesuo mia! Sinjorino!

Johano eltordis la revolveron, ĵetis ĝin en angulon de la ĉambro. La virino silente ekploris kaj fale sidiĝis sur la kanapon. Ŝi ĉirkaŭprenis sian fileton, kisadis lin freneze, senhalte.

Marusa staris senkonsile, rigardis jen al sia sinjorino, jen al Johano, kiu rompite pro la tumultaj okazaĵoj falis teren antaŭ la virino kaj klinis sian kapon sur ŝiajn genuojn.

Longa silento. Marusa piedpinte iris al la angulo kaj levis la forĵetitan revolveron.

– Dio mia! Dio mia! – ŝi ĝemadis mallaŭte. – Sanga korpo, blanka kitelo ne signifas bonon ... Mi diris ja ... Dio mia!

La mano de la virino moviĝis kaj karese palpadis la hirtiĝintajn harojn de Johano.

– Johano Juroviĉ! ... Ĉu vi povus pardoni min ... Johano Juroviĉ...

Ŝi denove ekploregis. Johano haltigis la karesantan manon kaj kisis ĝin.

Marusa milde ekpuŝis Johanon kaj mallaŭte demandis.

– Ĉu la sinjoro prokuroro mortis?

Johano rezigne respondis.

– Jes! ... Li mortis por ĉiam ...